


LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafthijk (N.H.)
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
Unuobla ekz. f 0.03
duobla ekz. f 0.06
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

LA PAŬTISTETO KAJ LIAJ VIVO KAJ SUFEROJ.

Sur la subtegmento, tuj sub la traboj, staras lia lito. Nur dum kelkaj horoj de la nokto li kuŝas en ĝi; la genuoj preskaŭ sur la mentono, ĉar ĉe la piedoj la pajlo pikas ĉiuflanke kaj la aĉa kovrilo, farita el ĉifonoj, estas multe tro mallonga kaj tro mallarĝa. Tra la tegmentaj fendoj fajfas la vento, ekstere susuras la abioj.

Apenaŭ la paŝtisteto trovas sian liton agrabla, kiam el la ĉambro de la farmisto sonas laŭta frapado. Certe, li aŭdas sed liaj okuloj ne volas malfermiĝi. „Kaj se ili malfermiĝi ne volas,” li pensas „ili restu fermitaj!” Li kaŝas sin iom pli profunde sub la kovriloj.

Denove frapado, sed multe pli laŭta. La farmisto krias el la ĉambro: „Atentu, maldiligentulo! Ĉu vi ree ne deziras ellitiĝi? Certe necesas, ke mi montru al vi la vojon. For el la lito!”

„Nun li venas kun „Karleto la Vipo”, la paŝtisteto pensas (ĝi estas vergo, plektita el branĉetoj), kaj li saltas en sia ĉifona ĉemizo el la lito kaj rapide li surmetas la rigidan, malmolan pantalonon ĉar, kiam li nur surhavas tiun pantalonon, tiam „Karleto la Vipo” ne estas tiel ege danĝera.


Vere vidante la farmiston kun „Karleto”, li krias: „Mi jam venas! Jen, mi jam estas!” kaj liaj okuloj larĝe, larĝe malfermiĝas.

Li ankoraŭ ne estas plene vestita, kiam la maljunulo grumbblas: „Jam sufiĉas! For, eksteren! La ŝafoj jam blekas.”

Prefere la infano lasus bleki la ŝafojn kaj manĝus kaĉon kiel la geservistoj, sed „Karleto la Vipo” estas tiel malmola ĝi ne toleras ŝercojn!

Li do rapidas al la stalo, elpelas la ŝafojn, iras al la erikejo kaj

tie li eksidas en la freŝa herbo. La knabo rigardas al la maten-stelo „Ĝi ankaŭ estas paŝtisteto,” li pensas, „La aliaj mal-



grandaj steloj ĉirkaŭ ĝi estas la ŝafoj. Ho, kiom da ŝafoj! Pli ol centmil blankaj ŝafoj kaj ŝafidoj. Ĉu ĝi ankaŭ ne ricevis kaĉon, ĉi-matene? Certe ne, ĉar ĝi paliĝas kaj paliĝas kaj perdas siajn ŝafojn. Nun la suno leviĝas, subite ĝi mem ankaŭ estas for.

Kiel dolĉe kantas la birdetoj en la larikoj kaj en la suproj de la abioj! Ili ĝuas ho jes. Ili povas resti en la nesto tiom longe kiom ili deziras; kaj kiam ili vekigās, ili povas flugi laŭplaĉe. Ĉie la tablo estas pretigita por ili. Ho, ho, kiom da diferenco kompare kun kompatinda paŝtisteto.

Vidu la belajn florojn, kiuj kreskas tie! Ĉu li plektu florrondon? Por kiu? Por la ŝafidoj? Sed ne, tiuj preferas manĝi ilin Tiuj pli ŝatas havi ilin en la stomako ol ĉirkaŭ la kapo! Por li mem? Ne, estus infanece, estas bone por stultaj knabinoj.

Nun la paŝtisteto grimpas trans ŝtonojn kaj deklivojn; li serĉas mirtelojn kaj rubusojn La bona Dio kreskigas ilin certe por malriĉaj paŝtistetoj, kiuj ne ricevis kaĉon.

Manĝinte sufiĉe, li ekkuŝas en la suno, kaj rigardas al la ŝafoj kaj ŝafidoj, kiuj plezure paŝtigās. Unu forkaptas la foliojn antaŭ la nazo de alia. La fortaj flankenpuŝas la malfortajn, kaj la malgrandaj akiras neniom. Ili devas kontentigi sin per la restaĵo „precize kiel ofte okazas ĉe la homoj”, li pensas.

„Ho, se mi nur estus granda!” diris la knabo al si mem. „Pli granda, multe pli granda, tiel granda, ke mi ne bezonus paŝti la ŝafojn. Treege mi dezirus falĉi, kun la aliaj servistoj kaj haki lignon en la arbaro. Mi povus sidi ĉe la tablo dum manĝa tempo kaj paroli kaj ridi! Kaj dimanĉe mi surmetus novan kostumon kaj mi irus en la preĝejon kaj mi fumus belan pipon, kaj monon mi havus en la poŝo, pli ol unu ŝilingon, kaj sabatvespere mi povus vagi kun la aliaj knaboj kaj kanti

Kiel bela sonĝo pri tiuj oraj tagoj de la estonto.

Tagmeze, kiam malsupre el la kamentuboj la fum-nuboj supreniras, tiam fariĝas tro varme sur la monto, en la akra sunardo. La ŝafoj iras en la arbaron. La paŝtisteto saltas post ili, sed la arbetoj kaj kavoj tro multe malhelpas lin. Subite — la ŝafoj estas for de la okuloj. Ĉie li kuras — ĉie li serĉas — krias: „Mek, mek, mek!” — Sed — ho ve, ili ne revenas. Oh, nun li vere ekplendas kaj ekploras: „Nun „Karlo la Vipo” traktos min!” Kontraŭvole li iras hejmen, al la mastro. Singultante li diras: „Mastro, vespo pikis min — kaj nun mi perdis la ŝafojn.”

„Perdis la ŝafojn?” diras la farmisto bonanime. „Nu, zorgu, ke vi retrovu ilin! Iru por serĉi, ne ploraĉu!”

Ĉi-foje „Karleto la Vipo” ne trovas laboron.

Fine reveninte en la arbaron li serĉas laŭpove, trovas la ŝafaron kaj kondukas ĝin al la stalo. Poste li venas en la ĉambron kaj ek-

sidas ĉe la tablo; la aliaj kompreneble jam manĝis; restis nur malmulte por li. Apenaŭ li estas manĝanta, kiam la farmisto krias: „Kie, pro ĉielo, estas tiu bubaĉo nun?”

„Ah”, komplete diras la mastrino, „li ja bezonas momenton por manĝi. Vi ĉiam estas tiom senpacienca. Kion li nun ree devas fari?”

Tuj piedfrapi la fojnon. Ni ne povas pli longe atendi je li; tuj ekpluvos!”

Antaŭ ol la farmisto finparolas, la knabo jam metas la kuleron sur la tablon, kaj kuregas al la herbejo. Tie oni jam firmigas la fojnamasojn. La knabo saltas sur ilin, piedfrapas por firmigi ilin. La fojnamasoj kelkfoje falas sur lin, la trunketoj pikas la genuojn, precize tie, kie la pantalonon montras truon! ... Sed kuraĝe li daŭrigas la laboron. Li prenas kaj metas la fojnon kaj aranĝas ĉion tiel, ke la suproj fariĝas rondaj, kaj la akvo povu deflui. Fine li plektas fojnrondon kaj fiksas ĝin supre.... Feliĉe, fine li estas preta! Sed ho ve, la fojnamaso ŝanceliĝas, ne staras sufiĉe fikse! Li tremas pro timo, fosas la manon en la fojnon, por ke li ne falu.

„Kio do estas al vi, knabo?” mokridas la servisto.

„La amaso falas! Ho, ho, tuj ĝi falos.”

Per unu piedbato la servisto puŝas ĝin rekta, sed la bato estas tiel forta, ke la knabo ruliĝas malsupren kaj preskaŭ rompas la brakon. Tiel li kuregas de unu amaso al alia La kompatinda knabo silente preĝas, ke baldaŭ pluvu ... tiam li ree povas paŝti la ŝafojn. La pluvo ne venas: la suno iom post iom malleviĝas, la ombroj longiĝis. Fine la servisto diras: „Nun sufiĉas por hodiaŭ!” kaj Katjo venas el la domo kun granda kruĉo da lakto kaj panego. Nun ĉiuj sidiĝas: la servisto tranĉas la panon. Katjo enverŝas lakton en la pladon kaj ĉiu prenas lignan kuleron por manĝi. Ankaŭ la ŝafisto volonte ekmanĝus, sed la servisto ne permesas al li, kaj diras: „Vi ne havas tempon, kunprenu pecon da pano kaj konduku la ŝafojn al la herbejo.”

Kun malĝojo en la koro la infano prenas la panon kaj iras al la stalo. Ĉe la pumpilo li trinkas iom da akvo kaj pensas: „Nun mi ricevos neniom antaŭ la vespero.”

La ŝafoj kaj ŝafidoj paŝtiĝas sur la erikejo; la ŝafisteto kuŝiĝas en la herbo kaj li rigardas al la blanka ĉielo. Tie staras centoj da nubetoj, delikataj kaj lanaj kiel ŝafidoj, kaj li meditas: „Mi nur estas malriĉa paŝtisteto, sed se mi bone kondutos, mi povos ankaŭ fariĝi servisto, kaj lasos kreski la lipharojn kaj mi edziĝos; poste mi fariĝos riĉa farmisto, kaj mi havos servistojn kaj bovojn kaj ŝafojn. ... Sed mia paŝtisteto ne malsatos!”

„Knabo, kie estas la ŝafoj?” subite kriegas la farmisto malantaŭ li. La knabo eksaltas: „Ho, ho, tie la ŝafoj iras en la grenkampo! Tro malfrue, tro malfrue! La farmisto estas tuj post li, kaj „Karleto la Vipo” estas tiel proksima. Nun la afero aspektas malbela! La farmisto prenas lin ĉe la kolumo kaj Karleto fajfas tra la aero kaj dancas sur lia dorso.

„Sciu!” krias la farmisto. „Se vi ankoraŭfoje perdos la ŝafojn mi demetos vian pantalonon!”

„Ho, mi bone gardos la ŝafojn, mastro!” diras la infano kaj obea li forpelas la ŝafojn el la grenkampo.

Kiam fine la ŝafoj estas en la stalo li devas zorgi pri la bovoj; ili plugis dumtage. Kaj ho, kia malagrabla laboro; fariĝas mallume, malsupre en la valo fantome murmuras la rivereto kaj la knabo ege timas. Ĉie li vidas longajn, moviĝantajn ombrojn; ardantaj fajreroj dancas en la herbo; de la ĉielo falas la steloj. Li restas tuj apud la bovoj kaj timtremas. Sed la servisto priridas lin ... li ne timas la mallumon. „Tiuj nigraj aĵoj? Estas ja la ombroj de arboj; kaj la brilantaj fajreroj? Estas lampiroj. Kaj la falantaj steloj? Kial timi ilin? Ho, jes, kiam homo fariĝas plenkreskulo, li ne kredas ĉiajn sensencaĵojn!”

Feliĉe, ankaŭ por la kompatindaj paŝtistetoj tiuj tagoj venos!

Nun li paŝtas ankoraŭ la bovojn kaj li sopiregas al la tempo, kiam la farmisto vokos lin hejmen.

Feliĉe, fine li estas libera! La dommastrino donas al li la vespermanĝon, sed kutime li estas tro laca por manĝi. Li preferas serĉi sian litaĉon sub la traboj kaj dormas kelkajn horojn, ĝis la nova tago havigos al li novan „paŝtistĝojn”!

(Laŭ la Aŭstria verkisto Peter Rosegger, kiu verkis ĝin antaŭ 40 jaroj proksimume.)

ENIGMOJ.

| | |
|-------------------------------------|----------------------------------------|
| Kun d, ĝi estas ludilo | Per 2 literoj, nomo de litero |
| Kun f, ĝi estas onidiro | Per 3 literoj, elemento |
| Kun g, ĝi estas kolekto da sonoj | Per 4 literoj, planedo |
| sen tiuj literoj ĝi estas sento | Per 5 literoj, vaporiĝanta fluidaĵo |
| | Per 6 literoj, korespondaĵo |
| Soissons, Francujo. | J. Bourniche. |

ARBETO, KIU VOLIS ALIAJN FOLIOJN.

Dum bona kaj aĉa vetero staris
Arbet' iam inter tilioj ;
Ĝi havis de la pied' ĝis la supro
Nur pinglojn anstataŭ folioj;
Kaj la pingloj pintaj pikis,
La arbeto tre indignis:

„Ĉiuj miaj kamaradoj
Per folioj vestas sin;
Pinglojn havas mi, neniu
Iam ajn karesas min;
Se realiĝus, kion mi dirus,
Pur-orajn foliojn mi dezirus.”

Dumnokte la arbeto dormis,
Matene ĝi vekigis;
Jen! Orfoliojn ĝi ja havis,
Ho, kia pomp' ekiĝis!
„Mi fieras, ĉiun ravas:
Orfoliojn nur mi havas!”

Sed kiam ree vesperiĝis,
Tra la arbaro viro iris
Kun granda sako, granda barbo,
La orajn vidis kaj deŝiris,
Ensakigis, longajn paŝojn faris:
Malplena la arbeto staris.

Malĝoje la arbeto diris:
„Mi inter la aliaj hontas;
La orfoliojn mi postploras;
Belegajn la aliaj montras.
Se realiĝus kion mi dirus,
Foliojn vitrajn mi nur dezirus.”

Kaj ree la arbeto dormis,
Matene ĝi vekigis,
Kaj nun foliojn vitrajn havis;
Ho, kia pomp' ekiĝis!
„Ho, tiom brilas ne najbaro,
Ne iu ajn en la arbaro!”

Hurla kirlovent' malica
Venis, kun humor' arbitra,
Kuris tra la verdaj arboj
Al la foliaro vitra.
Kuŝis la folioj vitraj
Sur la herbo disrompitaj.

La arbeto nun funebris:
„Sur la herb' la vitro kuŝas;
Sed ciklon' la arbojn verdajn,
Sen difekti ilin, tuŝas.
Se realiĝontan mi povus ekdiri,
Mi volus foliojn freŝverdajn deziri.

Ree dormis la arbeto ,
Vekiĝis frumatene;
Nun foliojn verdajn havis.
Ĝi ridis ĝojmiene:
„Ankaŭ mi foliojn levas;
Nun mi honti ne plu devas.”

Kun plenaj mamoj baldaŭ
Kaprino maljuna alsaltis,
Foliojn, herbojn serĉis
Por sia idaro; ĝi haltis,
Ekvidis arbeton, neniun demandis
Kaj ĉiujn foliojn ĝisbranĉe forfrandis.

Malplena ree la arbeto;
Ĝi diris en rezignacio:
„Ĉu verda, ruĝa, orkolora,
Por mi ja ne taŭgas folio!
Se miajn pinglojn mi ree akirus,
Neniam ian mallaŭdon mi dirus!”

Malĝoje la arbet' ekdormis,
Malĝoje ĝi vekigis,
Rigardis sin en sunobrilto:
De rido skuigiĝis!
Kaj ĉiuj mokridis pri l' stulta arbeto;
Sed tiu kunridis en ĝoja kvieto.

Kial la arbeto ĝojis
Kaj la kamaradoj ridis?
Sur la branĉoj, ĝiaj pikaj
Pingloj ĉiuj, ree sidis
La arbeton vi vidi povas;
Sed ne tuŝu, se vi ĝin trovas!
„Ho, kial ne?”
„Ĝi pikas tre!”

M. Strümpfel. Loŝnitz. Saksujo.

ĈU SINJORINO SMIT ESTAS HEJME?

Sinjoro Braŭn staris sur la perono kaj sonorigis; la servistino malfermis la pordon.

„Ĉu sinjorino Smit estas hejme?” li demandis.

„Eble ŝi estas hejme, Sinjoro,” respondis la servistino, „eble ne”.

„Mi ne parolas pri ebleco,” li daŭrigis. „Se ŝi estas hejme, la ĝusta respondo estas: **jes**, se ŝi ne estas hejme, **ne**. Denove mi demandas: Ĉu Sinjorino Smit estas hejme? Respondu klare!”

„Mi ne povas diri ĉu” ekdiris la servistino.

„Dum mia juneco”, li interrompis severe, „oni ĉiam instruis al mi, ke en la angla lingvo la vorto „nepovi” ne ekzistas. Nun rakontu al mi, ĉu sinjorino Smit estas hejme.”

„Mi ne scias, sinjoro.”

„Pensu!”

„Mia mastrino ofte diras al mi, ke mi tie ĉi estas ne por pensi, sed por labori.”

„Forgesu tiun konsilon momente, kaj provu, unufojon, pensi.”

„Mi pensas, sinjoro,” diris la servistino, „ke tutverŝajne sinjorino Smit estas hejme.”

„Tio estas multe pli bona,” li diris ĝoje. „Vi pensas bone, kaj nun mi volas vidi ŝin.”

„Eble ŝi tre ĝojas, vidante vin,” diris la servistino, dum ŝi komencis fermi la pordon.

„Haltu!” li diris, metante sian piedon trans la sojlon. „Vi eraras, ne fermu la pordon nun, sed larĝe malfermu ĝin. Vi diris, ke Sinjorino Smit estas hejme.”

„Mi diris, sinjoro, ke mi pensas, ke ŝi estas hejme.”

„Tio sufiĉas!” li diris, klopodante enpenetri perforte. „Mi volas eniri, ĉar mi supozas”.

„Supozu kion vi deziras sinjoro”, diris la servistino, dum ŝi fermis la pordon. „Ĉu sinjorino Smit estas hejme, aŭ ne, ĉimomente, certe estas, ke ŝi ne loĝas tie ĉi.”

Haarlemo, Nederlando

trad. Pikilo.

Estas kelkaj, kiuj ĝis nun ne pagis la abonon ek de 1 Julio 1934. Ni prezentos kvitancon al ili — Aliaj jam pagis dufoje. Estas: Frato van Son, S.ro Kunnen, S.ino de Haas. Ili do jam estas abonantoj ĝis 1 Julio '36.

KNABA TRAVIVAJO.

Estis somero. Iu vespero dum la fojnperiodo.

La alte ŝarĝitaj fojnoĉaroj, duope, kelkfoje eĉ trio-pe, malrapide, kun knarantaj radoj veturis hejmen.

Sur la bonodoraj ŝarĝoj, kunligitaj per ŝnuroj kaj fostoj, ripozis la lacaj laboristoj. Ankoraŭ devis ili amasigi la fojnon en la fojnejo, por ke la bovinoj havu manĝaĵon dum la vintro. Poste ili baldaŭ enlitiĝos. Dum la fojnperiodo oni nur havas malmultan tempon por dormi.

Okjaraj knaboj sidis sur apogilo de ponteto, kiun oni konstruis trans la longfosaĵon. Mi estis inter ili.

Ni vidis tiun senĉesan preterpasadon de malrapidaj veturiloj, kaj en nian junan cerbon venis la ideo marŝi malantaŭ ili, laŭvice, ĝis la najbara domo. Ho malicetaj knaboj!

Ĉiufoje, kiam veturilo alvenis, unu knabo kaptis ŝnuron aŭ tabulon, kunmarŝis proksimume cent metrojn, poste revenis fiermiena al siaj amikoj.

Mia vico venis.

Alproksimiĝis veturilo kun malmulte da fojno, la ĉevalo ne iris paŝe, sed trote. Tamen kuraĝe mi kaptis la unuan trovitan objekton, kaj rapidegis!

Ho ve! Miaj kruroj estis tro mallongaj por kuri same rapide, kiel la ĉevalo. Mi tenis min al rastilo, kiun la kamparano estis fiksinta en la fojno iom post iom ĝi forglitis, kaj jen mi sur la vojo, en miaj manoj la rastilo, dum la veturilo malproksimiĝis.

Kion fari? Simple mi povus forĵeti la objekton, kaj ĝia posedanto hejme pensus, ke li perdis ĝin. Sed mi estis nur okjara.

Do malespere mi kriis: „Ho, ho, via rastilo falas de la veturilo!”

La ĉevalo haltis, la ĉaristo venis al mi, reprenis la rastilon, laŭdis min pro la sciigo kaj min rekompencis. Mi ricevis unu cendon! En nia vilaĝo kun ducent loĝantoj estis nur unu butikio. En tiu ĉi mia patrino aĉetis kafon kaj teon, spicojn; mia patro tabakon, sed neniam mi tie aĉetis iun ajn frandaĵon. Do mi ne kuraĝis aĉeti ian bongustaĵon. La butikisto ja tuj rakontus tion al miaj gepatroj, kaj mia patrino tuj demandus al mi, kiel mi ekhavis tiun cendon. Do mi devis teni mian cendon en la poŝo. Sed kiam mia patrino vespere traserĉus miajn poŝojn, kaj trovus la cendon? Ankaŭ tiam mi devus rakonti pri la cendo, ĉar neniam mi ricevis monon de miaj gepatroj.

Ankoraŭ mi simple al mia patrino povus rakonti, ke mi ricevis ĝin kiel rekompencon por levpreni perditan rastilon; sed mi nur estis okjara. Pro mia malespero mi fine decidis. Apud nia korto estis malpura, kota longfoso, kaj en tiun longfoson mi ĝoje ĵetis la malbenitan cendon, kiu malaperis.

Nun mi estis trankvila, kaj neniam mi revidis ĝin. Sed ankaŭ neniam mi forgesos la timegon, kiun antaŭ kvardek kvin jaroj tiu cendo kaŭzis al mi.

Originale verkis S. V.

Nederlando.

POR KOMENCANTOJ.

LA ABELO KAJ LA KOLOMBO.

Malfeliĉa abelo falis en rivereton. Tion vidis kolombo, kaj ĵetis folion de arbeto en la akvon. La abelo naĝis al la folio kaj savis sian vivon.

Okazis post kelkaj tagoj, ke nia kolombo pace kaj kviete sidis sur arbeto. Ĉasisto intencis mortpafi ĝin. Tion vidis la abelo, alflugis, kaj pikis al li la fingron. „Puf!” La pafo maltrafis. Nun la kolombo savis sian vivon.

LA CIKONIO KAJ LA RANOJ.

Cikonio staris ĉe laĝeto. Multaj fiŝoj kaj grasaj ranoj naĝis en la akvo. Sed la akvo estis profunda kaj la cikonio ne kuraĝis eniri.

Ĝi malsatis, tial ĝi uzis ruzon.

Ĝi kuŝiĝis sur la bordo, kaj faris, kvazaŭ ĝi estas morta.

Tion vidis rano kaj kvakis: „Rigardu, nia malamiko estas malviva!” Tuj alvenis sur la bordon multaj ranoj por vidi la cikonion. Sed, ho terure! Ĉi tiu reviviĝis kaj kaptis unu ranon post la alia kaj forglutis ĉiujn. Malmultaj savis la vivon. La cikonio ne plu malsatis.

Sed de tiu tempo la ranoj ne plu venas sur la bordon, se ili vidas cikonion. Ili silente atendas ĉe la bordo en la akvo, ĉar ili timas denove perfidon.

Aŭstrio.

El la germana trad. J. Wiesböck.

LA DEKDUA LECIONO.

Mia patro.

A. 1. Mia patro estas bona viro. 2. Mi amas **lin**. 3. Li ofte kantas kaj **fajfas**. 4. Sed nur, kiam li estas **bonhumora**. 5. Tiam li ankaŭ **razas sin**. 6. Kiam li koleras pri la politiko, tiam li ne kantas kaj li ankaŭ ne razas **sin**. 7. Tiam mi devas resti tute silenta. 8. Kiam li **ricevas** la **salajron**, li **ion** alportas por la patrino kaj mi. 9. Tiam ni estas **gajaj**. 10. La patro amas la **sporton**, li ofte **vizitas** la sport-**kampon**. 11. La kamaradoj amas **lin**. 12. En la **kunvenoj** li ofte parolas. 13. Antaŭ kelkaj tagoj eĉ la ĵurnaloj raportis pri la parolado de mia patro. 14. La patrino estis tre fiera.

Viĉjo, 10-jara (Berlin-Neukölln).

B. La bela birdo. La birdo estas bela. La birdo **kantas** bele. Bona respondo — bone respondi, frua alveno — frue alveni, forta bato — forte bati, kontenta rido — kontente ridi.

C. legi — legejo, **bani** — banejo, **baki** — bakejo, herbo — herbejo, **kui**ri — kuirejo, ludi — ludejo, **halti** — haltejo, lerni — lernejo, koko — kokejo, hundo — hundejo, loĝi — loĝejo.

URBA INFANO RAKONTAS.

D. 1. Ni loĝas jam longe en Amsterdamo. 2. Nia loĝejo havas tri malgrandajn ĉambrojn, unu kuirejon, kaj mallongan koridoron. 3. En la domo loĝas multaj homoj. 4. Ili estas malriĉaj. 5. Mi vizitas la **publikan** lernejon. 6. Ĝi staras **proksime de** nia domo, **apud** granda placo. 7. Kiam ni iras al la lernejo, ni vidas multajn fabrikojn, malpurajn kanalojn, magazenojn kaj hotelojn. 8. Dum la **monato Aŭgusto** ni estas **liberaj**. 9. Tiam la patrino ne estas ĝoja. 10. Nia ludejo estas la strato, kaj ofte ni **difektas** la vestojn. 11. Iam mi falis el la dua **etaĝo**. 12. Mi rompis mian **kruron**, sed la **kuracisto helpis** min bone. 13. Mi povas tamen rapide kuri, **preskaŭ tiel** rapide, **kiel** la **tramo**! 14. La tram-haltejo estas antaŭ nia domo.

I. Lernu parkere la novajn vortojn en A, B, C, D.

II. Traduku A, B, C, D, en vian gepatran lingvon.

III. Post kelkaj tagoj traduku A, B, C, D, el via gepatra lingvo en Esperanton.

IV. Respondu al la demandoj:

A. Ĉu via patro estas bona viro? Ĉu vi amas lin? Kion li ofte faras?

Kiam li kantas kaj fajfas? Kion li ankaŭ faras tiam? Kiam li ne kantas kaj ankaŭ ne razas **sin**? Ĉu mi tiam povas paroli? Kiam li alportas **ion** por la patrino kaj mi? Kiaj ni estas tiam? Kion amas la patro? Kion li ofte vizitas? Kie li ofte parolas? Pri kio raportis la gazetoj? Kiu estis fiera?

B. Kie ni loĝas? Kion havas nia loĝejo? Kiu loĝas en la domo? Ĉu ili estas riĉaj? Kion ni vizitas? Kie staras la lernejo? Kion mi vidas? Kiam ni estas liberaj? Ĉu la patrino tiam estas ĝoja? Kio estas nia ludejo? El kio mi falis? Kion mi rompis? Kiu helpis min? Kie estas la tram-haltejo?

Uzu la jenajn vortojn en frazoj: akvo, amo, amiko, angulo, apetito, ansero, araneo, arbo, arlekeno, arto, aŭtobuso, banano, bastono, besto, bluzo, botelo, bovo, breto, broso, butono, cendo, ĉambro. Ekz.: La **akvo** estas en la glaso. Li estas mia **amiko** en ĝojo kaj ploro.

La instruisto klarigu la enhavon de la kanto: „Trifoli' ĉe montfino”, No. 2-3. Poste la klaso kantu ĝin.

LA DEKTRIA LECIONO

EN LA KAJUTO.

A. La patro kaj la infanoj **ŝip-veturis** por viziti la onklon en la urbo. Fine ĉiuj estis en la kajuto. Ili sidis sur benkoj. En la mezo staris tablo. Petro **puŝis** la tablon.

„Mi ne povas for**ŝovi** ĝin. Kial ne, patro?”

Antaŭ ol li povis respondi, la ŝipo ricevis fortan puŝon. Ĝi **balancigis** de unu flanko al la alia. La infanoj preskaŭ falis. La fratino **kaptis** la patron ĉe la brako kaj krietis. La aliaj homoj ridis.

„Ĉu vi nun **scias**, kial oni fiksis la tablon?” demandis la patro.

La infanoj ne ŝatis longe resti en la kajuto. Ĉiam sidi sur la sama loko, tio ne estas **agrabla**.

„Ĉu ni povas rigardi **supre**, patro?” Heĉjo kaj Petro jam glitis de la benko.

„Momenton,” diris la patro. „La vento estas malvarma.”

La societo iris **supren**. La infanoj ege miris! **Ĉie** akvo. **Je** granda **distanco** ili vidis turon kaj muelejon.

„Kie ni nun estas? Kio estas tio?” kriis Petro kaj Manjo.

„La **lago**, ĉu ne patro?”

„Jes, Heĉjo.”


„La lago,” diris Manjo mallaŭte. **Pri** tio ŝi jam ofte **aŭdis**. Si

rigardis kaj rigardis. Ho! granda akvomaso! Hoho, kiel vasta ĝi estas!

„Mi vidas turon,” diris Heĉjo. Li **montris** ĝin per la **lingro**.

„Mi vidas du,” diris Manjo.

„Tio estas la turoj de la urbo,” diris la patro. Post unu **horo** ni estos en la urbo.”



Petro atente rigardis. Nun li ankaŭ rekonis la turojn.

„Venu, infanoj, ni iru malsupren. Ĉi tie estas tre malvarme.”

B. **Jus**, ili estis en la kajuto, kiam la **kapitano** petis **monon** por la vojaĝo.

El: „Ligthart en Scheepstra, Dicht bij Huis”, J. B. Wolters, Groningen—Den Haag—Batavia.

„He,” **ĝemis** Manjo.

„Kio estas al vi?” demandis la patro.

Estis nenio, sed Manjo ne povis longe sidi sur sama loko.

„Rigardu tra la fenestretoj.”

Tio estis **amuza**. La infanoj **genuis** sur la benko, kaj rigardis tra **la komikaj rondaj** fenestretoj. Komence ili estis **trankvilaj**.

„Mi vidas domon,” diris Petro.

„Mi ankaŭ,” diris Heĉjo. „Sed mi ne komprenas, **ŝajnas**, ke staras domoj sur la lago!”

La pasaĝeroj ridis.

„Ni jam estas trans la lago,” diris la patro.

„Hoho, kiel strange!” kriis Manjo.

„Kio estas?” demandis la patro.

„La **bordo** iras for kaj la ŝipo ne veturas.”

„Ankaŭ ĉe ni!” vokis Heĉjo kaj Petro. Ili saltis de la benko kaj suriris la **ŝtuparon**. Tiun **aferon** ili deziris **ekzameni**.

„Restu ĉi tie,” diris la patro. „Nur ŝajnas.”

„Kaj ni povas **klare** vidi tion!” persistis Heĉjo.

La infanoj **denove** rigardis tra la fenestretoj. Nun ili vidis, ke la patro estas prava. Li diris la veron.

Post mallonga tempo ili **atingis** la urbon. Baldaŭ ili staris sur la bordo, kie la onklo atendis ilin.

- a. Lerne bone la novajn vortojn.
- b. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
- c. Lerne parkere la duan parton de la leciono (B. ĵus ili estis en la kajuto,) kaj recitu la enhavon en via esp. grupo.
- d. Legu kelkfoje la lecionon kaj respondu al jenaj demandoj:

Kiuj ŝipveturis? Kien ili iris? Kie fine ili estis? Kie ili sidis? Kio staris en la mezo? Kion puŝis Petro? Ĉu li povis forŝovi **ĝin**? Kial ne? Kio **okazis**? Kiuj ridis? Ĉu la infanoj restis longe en la kajuto?

Kion ili deziris? Kion diris la patro? Kien iris la societo? Kion vidis la infanoj? Pri kio Manjo ofte aŭdis? Kion ŝi vidis? Kion vidis Heĉjo? Per kio li montris **ĝin**? Kion vidis Manjo? Kion diris la patro? Ĉu ili jam baldaŭ estis en la urbo? Kion Petro faris? Ĉu li ankaŭ vidis la turojn? Kion diris la patro? Kiu petis monon?

Traduku: bakisto, butikisto, flikisto, ĝardenisto, horloĝisto, hotelisto, instruistino, kantisto, kuiristo, laboristo, lavistino, maŝinisto, meblisto, okulisto, pordisto, portisto, raportisto, razisto, skribisto, ŝipisto, ŝafisto, ŝuisto, tamburisto.

Uzu la jenajn vortojn en frazoj: ami, aperi, atendi, atingi, aŭdi, aŭskulti, babili, baki, bani, bati, brili, buĉi, celi, damandi, devi, deziri, difekti, diri, dormi, ekzameni, esperi, esti, fabriki, fajfi, fali, falĉi, fiksi, genui.

La instruisto klarigu la enhavon de la kanto „Vireto en Arbaro”, No. 9. Poste la klaso kantu ĝin.

TRI SAĜAJ MIGRULOJ.

Tri junuloj nokte migris tra arbaro kaj haltis ĉe krucvojo. Neniu sciis la ĝustan vojon. Ili vidis vojmontrilon, kiu montris per siaj tri brakoj la celon de tri vojoj. Sed la junuloj ne povis legi la montrilon, ĉar la nokto estis tro malluma.

Jen unu el la tri trovis rimedon. Li etendis siajn fortajn, longajn brakojn, derompis la tri montrilojn kaj metis unu ĉe la alia sur la teron. Poste ili bruligis alumeton kaj la tri kunuloj legis:

„Montvilaĝo”, „Arbarvilaĝo”, „Valvilaĝo.”

„Al Valvilaĝo ni deziras iri, „ĝoje kriis du el ili. Sed la tria mallevis la kapon kaj demandis: „Kiu el la tri vojoj nun kondukas al Valvilaĝo? Mi ne scias!”

La du aliaj tion ankaŭ ne povis diri kaj feliĉe venis migrulo, kiu diris la ĝustan vojon, alie ili certe ankoraŭ starus sur la sama loko.

Aŭstrio.

J. Wiesbock.

LA VULPO KAJ LA VINBEROJ.

Tute supre sur vinber-arbo pendis kelkaj maturaj fruktoj. Avida vulpo vidis ilin kaj deziris formanĝi la dolĉajn berojn. Ĝi eksaltis por kapti ilin ĝi provis grimpi sur la arbon ĝi tiris la branĉojn malsupren ĉio sen sukceso! Ĝi ne povis akiri la belajn fruktojn. La birdoj mokridis ĝin. La ruzulo tamen ne volis montri sian ĉagrenon kaj diris: „Mi ja tute ne ŝatas la vinberojn. Ili estas tro acidaj!”

Poste ĝi foriris.

Aŭstrio.

J. Wiesböck.

Ĉar ni intencas doni pli da bildoj en „La Juna Vivo”, ĝi provizore aperos monate je 16 paĝoj. — En ok-paĝa kajero ni ne havas sufiĉe da loko por ĉiu rubriko. Krome per monata eldono ni ŝparas monon kaj tempon.

Danujo.

Infana Esp. grupo en Odense (14-jaraj geknaboj) aranĝos internacian poŝtkartvesperon la 6-an de februaro. Sendu belajn ilustritajn poŝtkartojn al S. ro E. Halager, instruisto, Lahnsgrade 57, Odense (Danujo) Ni nepre respon-
dos al ĉiuj.

Sovetio.

Bonvolu sendi poŝtkartojn kun bildoj pri Esperanto, il. afiŝojn, glumarkojn, librojn, insignojn, por ekspozicioj. Adreso: Petro Surjanenko, **Valki**, Ĥarkovska Oblast, Ukrainio, Sovetio.

Sovetio.

Lernantoj el 7a klaso, inter kiuj multaj junpioniroj, dez kor. pr. ĉ. t. pre-
cipe pri lerneja laboro kaj socia, ripoz-tempo kaj ĝia uzo. Adreso: U.S.S.R.
Uzbeka resp., *Kokand*, ul. Libknechta, lernejo No. 24. Por Esperantrondeto.

Nederlando.

„La Junaj Esperantistoj” (infankurso) deziras interŝanĝi Pl. kĉl. Gvidanto:
D. v. Dijk, instruisto, Hensbroekerstr. 8, Nieuwendam, Nederlando.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. En la bulgara infangazeto („Vaseladruĝina”) aperis: „La blinda poeto
kaj la alaŭdo”, No. 7, La mirakla resaniĝo”, No. 9. En la holanda viringazeto
„De Proletarische Vrouw”: „lu fakto, ie, dum la mondmilito”, No.8, kaj
„Militema Filo” No. 11. Ankaŭ E. Osmond, Anglujo, kaj H. Eckel, Danujo,
tradukis tiujn rakontojn.

La fabelo de la azenoj (No. 1) aperis en ĥina gazeto tradukita, en japana
(esperante) kaj en franca (france-esperante) en U.S.E. (Rumana) kaj en
bulgara infangazeto.

Daŭrigu tiun laboron, ĝi estas multvalora!

2. Aperis artikoloj pri „La Juna Vivo” en Iu Japana Gazeto”, Franca
Esperantisto”, No. 11, „La Socialisto” No. 4, „Scienca Gazeto”, No. 6, „La
Suda Stelo”, 9-10. „De Morgen”, 8 Dec.

3. La jenaj novaj infangrupoj abonis „La Juna Vivo”: Nederlando: Am-
sterdam, Zaandam, Benningbroek.

Danujo: T. Kalundborg.

KORESPONDADO.

1. B. Soissons, Francujo: Ni enpresigos ĉion.

2. N., Kalundborg, Danujo: La bela historio aperos en No. 14.

3. M., Diĝon, Francujo: La melodion oni „mort”kantis en Holando. Ni
farigos alian melodion. La vortoj de la kanto estas belaj. La rakonto nur
taŭgas por plenaĝuloj. Ĝi ne estas neŭtrala.

4. J. S., Leiden, Nederlando: La enhavo kaj stilo ne sufiĉas.

5. D., Turĉiansky, Ĉeĥoslovakujo: Rilate al la eraro en la „Lulkanto” vi
pravas. Je la fino de la jarkolekto ni korektos la tuton. Koncerne la fabelon,
mi timas, ke la infanoj ne komprenos la moralon.

6. O., H., Ĉeĥoslovakujo: Mi legis kaj relegis vian „Heroecon”, sed la stilo
ne fluas.

REKLAMTARIFO:

**I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
1/16 paĝo: 2 gld.**

Jarkotizo

| | |
|---------------------|------------|
| Aŭstrujo | 3.20 ŝil. |
| Britujo | 3 ŝil. |
| Belgujo | 15 fr. |
| Ĉeĥoslovakujo | 16½ Ĉ. kr. |
| Danujo | 3 kr. |
| Francujo | 10 fr. |
| Svislando | 2. 10 fr. |
| U.S.A. | 0.70 dol. |
| Bulgarujo | 58 lev. |
| Germanujo | 1.75 M. |
| Hispanujo | 5 pes. |
| Hungarujo | 3.30 p. |
| Latvujo | 2. l. |
| Norvegujo | 2.7 kr. |
| Polujo | 3.6 zl. |
| Rumanujo | 72 l. |
| Svedujo | 2.70 kr. |



„FLORETOJ”

**Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)**

**Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj
de C. Jetses
prezo 0.70 ned. guld.**

**Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:**

J. B. WOLTERS

**Groningen — Den Haag
Batavia.**

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Ameriko: Amerika Esperanto-Instituto, Madison, Wis., Usono.

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

Belgujo: Hendrik Ranson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Bulgarujo: Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, Sofia.

Danujo: S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev.

Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d'Or.
ĝironumero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d'Or).

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana
ĝironumero: „Köln 104097”.

Hispanujo: S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2º, 3º, Barcelona.

Svedujo: John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

Japanujo: Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

Ĉinujo: S-ro Can, 15 Shang Sieh Chiai, Peiping.

Oni povas pagi per poŝtmandato, 8 respondkuponoj, ĝirokonto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtofacejo, kio estas la plej malkara.